# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 1/1996 JANUARO-FEBRUARO

### SES-KOTIZOJ/ABONOJ 1996, alvoko de la kasisto

En ĉi tiu eldono de SES-INFORMAS vi trovas kiel kutime enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon por 1996. Mi tre petas ke vi faru tion ne pli malfrue ol fine de junio 96!

La sama enpagilo servas ankaŭ por donacoj; ankaŭ tiaj estas ĉiam bonvenaj!

Pro tio bonvolu nepre indiki sur la enpagilo kion vi pagas, do ekzemple:

"Kotizo 1996", aŭ "Abono 1996", aŭ "Donaco"

La KOTIZOJ INKLUZIVAS abonon al LITERATURA FOIRO LF kaj SES-INFORMAS SI:

| | | |
|---|---|---|
| Infanoj ĝis 18 jaroj | SFR | 6.- |
| Gejunuloj ĝis 26 jaroj | " | 35.- |
| Emeritoj, pensiuloj | " | 35.- |
| Geedzoj emeritaj | " | 55.- |
| Ceteraj membroj | " | 60.- |
| Geedzoj | " | 90.- |
| Dumvivaj membroj | " | 1200.- |
| Dumvivaj membroj emeritaj | " | 700.- |

---

| | | |
|---|---|---|
| Abono al SI, sen membreco | " | 35.- |

Tutkoran dankon por baldaŭa pago!

Via Ernst von MAY

oo O oo

## Ĝ E N E R A L A  K U N V E N O  SES 1996

La ĝenerala kunveno de SES estas kunvokita al la hotelo TERMINUS en Neŭŝatelo/Neuchâtel/Neuenburg, por sabato la 23-an de marto 1996, ekde 10h30, por diskuti laŭ la sekvanta

### T A G O R D O

1. Komunikoj de la prezidanto
2. Elekto de la tagprezidanto, de la protokolanto, de la voĉnombrantoj
3. Aprobo de la protokolo de la pasinta kunveno (aperis en "SI" 5/95, paĝoj 1-5
4. Morala raporto
5. Financa raporto
6. Statutmodifoj
7. Esperanto-Ekzamenoj kaj diplomoj
8. Eventuala elekto de nova komitato *
9. Diversaj

* Tagordero pritraktota nur se la kunveno aprobos statutmodifon, kiu kunfandas la Estraron kaj Komitaton. -PM-

oo0oo

Pluaj detaloj sekvos en SES INFORMAS 2/96.

Karaj SES-anoj, ŝatataj geamikoj,

Nova jaro malfermiĝas, kun siaj perspektivoj, promesoj kaj duboj, post la ĝoja tumulto de la festotagoj. Ĝin ni ĉiel alfrontu kun optimismo kaj pozitiva elano, kiel bonaj esperantistoj laŭdifine devas fari – sed ankaŭ kun la necesa realismo. Tial, ni unuavice rerigardu al la jaro ĵus pasinta, por havi klaran memoron pri la farita kaj, el tio, fidindan indikon pri la farota, farinda kaj farenda.
Ĝojiga konstato estas la nuna ĉeesto, en la SES-estraro, de bone funkcianta sekretario, en la persono de Anĝelo Mellini, kiu ankaŭ respondecas pri la Regionaj Semajnfinoj en Alemanio. Tiamaniere la prezidanto ne plu estas tiom laborŝarĝita, kaj povos intensigi la rektajn kontaktojn kun la lokaj grupoj, kiujn ŝi devis parte neglekti, post tre interesaj kaj utilaj spertoj.
Same pozitiva estas la ekagado de Elisabeth Lauper, la nova A-komitatano de SES ĉe UEA: kvankam ankoraŭ nesperta, ŝi profitis la informojn de la estraro kaj klopodis digne aŭdigi la voĉon de Svislando en la komitatkunsidoj de la lasta UK.
La instruoj de la Merkatika Seminario, plej koncize resumitaj de la gvidinto, d-ro Picasso, aperos baldaŭ kiel speciala kajero de ***SES Informas***, senpage sendota al la membroj de SES. Nemembroj povos utile ĝin aĉeti – aŭ rapide membriĝi! Kaj juna, nova membro de SES ĉeestis, komisie de la Societo, semajnan kurson de Marco Picasso ĉe La Kvinpetalo (tiaj merkatikaj kursoj okazas regule, ĉiufoje kun difinita celo): en ĉi tiu sama kajero vi legos pri lia sperto. Estas konsilinde por tiuj, kiuj volas pliprofundigi la sciojn akiritajn dum la Merkatika Seminario, partopreni en similaj kursoj, tre utilaj por akiri praktikon informan: ja ni devas daŭre kaj trafe informadi, se ni volas ke nia Esperantio kresku, kvante kaj kvalite!

Alia kontentiga punkto en la SES-agado estas la jam tradicia disvolviĝo de la Regionaj Semajnfinoj romanda kaj tiĉina. Ilia alta nivelo valoras partoprenon el la tuta lando: kaj post la bona provo de la Merkatika Seminario ni atendas kun antaŭplezuro la Alemanan semajnfinon, pri kiu vi ricevos baldaŭ informojn.
Viaj Estraro kaj Centra Komitato, karaj geamikoj, krom la ceteraj kontaktoj kunvenis kvarfoje kaj interalie pretigis detalan proponon pri ŝanĝoj en la statuto (el kiuj unu, la kunfando de Estraro kaj Centra Komitato, estis de vi jam principe aprobita dum la pasinta ĝenerala Kunveno). Post diskuto kaj aprobo de ĉi tiuj ŝanĝoj ni havos definitivan tekston kaj ni povos, kiel jam antaŭvidite de la antaŭa Estraro, traduki ĝin al la tri ŝtataj lingvoj de Svislando.
Dum la tuta jaro la SES-anoj ricevis, kun laŭdinda reguleco, kaj ***Literatura Foiro***-n kaj ***SES Informas***: ili povas fieri pri tiom bona kaj kompleta servo, kiun malmultaj esperanto-asocioj de aliaj landoj povas liveri! Post legado, estas oportune utiligi la kajerojn, speciale ***Literatura Foiro***-n, por montri al ne-esperantistoj - kiuj foje ankoraŭ sin demandas, ĉu nia lingvo plu vivas - ĝian forton, altan nivelon kaj viglan ligon kun aktualeco.
Nu, kiel vi vidas, SES ne pigris, kvankam certe estas ankoraŭ multego por fari. Pri tio ni diskutos dum la venonta Ĝenerala Kunveno, ĉe kiu mi esperas vidi multajn individuajn membrojn kaj reprezentantojn de lokaj societoj, por vigla interŝanĝo de ideoj. Kaj post la asemblea laboro, bona distro estos la riĉa programo ĉe La Domparo, al kiu ĉiuj samideanoj estas kore invititaj, por kompletigi en amika kuneco nian jaran esperanto-festeton!

Kun la plej koraj bondeziroj,

Perla Martinelli

prezidanto

# Lingvo-ekzamenoj kaj diplomoj en la svisa Esperantio: ĉu baldaŭa solvo?

Svislando spertas delikatan problemon: male ol en la najbaraj landoj, mankas ĉe ni iu instituto kiu decidas pri studprogramoj, organizas ekzamenojn kaj disdonas diplomojn. Kompense, se ne ekzistas iu Svisa E-Instituto, ekzistas Kultura Centro Esperantista, lingve prestiĝa institucio, kiu rolas analoge al FEI, GEI, AEI kaj IIE tiurilate. Tial SES, meze de la 80aj jaroj, komisiis al KCE studi la problemon kaj proponi solvon. Tiu rolo de KCE (= lingva kaj instrua institucio), komplementa al SES (= propaganda kaj informa societo), trovis poste konfirmon per decido de la ĝenerala Kunveno en Lucerno, 1993.

KCE fakte proponis ke la internacia ekzameno de ILEI (kaj la koncernaj diplomoj) estu la lingva ekzameno por Svislando. Mi ne memoras ĉu SES ratifis tiun proponon; kiel ajn, KCE komencis apliki ĝin. Sed subite la ILEI-ekzameno montriĝis neserioza, laŭ tre severa raporto de Mireille Grosjean. Sekve ĝi paneis, kaj la nova Komitato de KCE (kie ne plu estas Grosjean, nek Gacond nek Künzli) ne intencas reokazigi ĝin. Necesas do serĉi novan solvon.

Post demando tiurilata, flanke de Lucerna E-Societo, la SES-prezidanto urĝis la KCE-Komitaton, kaj Giorgio Silfer, prezidanto de KCE, tuj dissendis cirkuleron al la Kultura Konsilio kaj kunvokis ĝin por diskuti la problemon.

La Kultura Konsilio estas speciala komisiono, konsistanta el la plej eminentaj esperantologoj svisaj (interalie Baur, Carlevaro, Piron...) kaj el la delegitoj de kelkaj societoj registritaj en Svislando, kiuj esprimis la deziron partopreni en la laboroj: SES, tra Holgst Siebers, LF-koop, Junularo Esperantista Svisa, Esperanta PEN-Centro, Svisa ILEI-Sekcio, Tiĉina E-Ligo, la E-societoj de Ĝenevo, Laŭzano kaj Bazelo. Tiun ĉi senpagan ŝancon povas eluzi ankaŭ aliaj societoj, se ili volas.

La Kultura Konsilio de KCE estas nur konsulta instanco: post perleteraj kontaktoj, la konsilianoj kunsidos ĉe La Domparo la 17an de februaro 1996, kaj la postan tagon ilian proponon la Asembleo de KCE formaligos per propra decido, kiun ĝi transdonos al SES. La ĝenerala Kunveno de SES diskutos tiun proponon kaj decidos ĉu aprobi ĝin aŭ ne, en Neŭŝatelo la 23an de marto 1996.

Praktike, KCE funkcias kiel komisiono de fakuloj, ŝarĝita de SES studi la problemon. SES decidos mem kion fari el la ricevota solvopropono.

*Perla Martinelli*

## G R U P A J   I N F O R M O J   1996

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.
13.1.17.00h kaj 3.2.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO; Spitalgasse 37.
9.1.19.30h kaj 6.2.19.30h

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
Ĉiun vendredon 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "La Stelo" Genève.**
En restoracio INTERNATIONAL (Boulevars Georges-Favon 21
13.1. Zamenhofa Festo, ekde la 12-a horo.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO (LES):**
10.1.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big Ben. Gvidos Franz Brügger.
25.1.20.00h Monata Kunveno: Muziko kaj kantado. Estas por la lasta fojo en restoracio Simplon.
14.2.14.00-16.00h Paroliga kunveno. Gvidos Franz Brügger.
1.3.20.00h Ĝenerala kunveno en restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, en Emmenbrücke.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Untere Bahnhofstrasse 18.
10.1.20.00h Monata Kunveno
14.2.20.00h Monata Kunveno

oo0oo

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**

Ek de 1996 ESZ disponas pri propra ejo en la domo de Nelida kaj Dietrich Weidmann, Eisengasse 22, subtera etaĝo. Ni tie okazigos regulajn aktivecojn.

8.1.19.15h Monata Kunveno, klubejo Eisengasse 22, subtera etaĝo.
29.1.19.15h Libera Kunveno, klubejo Eisengasse 22.
12.2.19.15h ĝenerala kunveno, Klubejo Eisengasse 22.

**Venontaj kursoj por komencantoj okazos:**

Dum la semajnfinoj, sabate 3./4. kaj 17./18. de februaro 1996.
Sabate: 11.00-13.00h kaj 18.00-20.00h.
Dimanĉe: 11.00-13.00h kaj 14.00-18.00h.

**Loko.** ESZ-klubejo, Eisengasse 22 8008 Zürich. (Ek de Bellevue Tramoj 2 aŭ 4, ĝis haltejo Kreuzstrasse).
**Kostoj:** Por ESZ-membroj Fr.240.- por nemembroj Fr.288.- (Entute 24 lecionoj). Aliĝo al ESPERANTO-SOCIETO ZÜRICH; Poŝtfako 301, 8034 Zürich.

oo0oo

**G R A N D A  Ĝ O J O !**

Nelida kaj Dietrich kaj Linda Weidmann havas la ĝojon anonci al siaj geamikoj, ke la 24-an de aŭgusto 1995, je la 12.33 horo naskiĝis nia filino, respektive fratino

**J A S M I N  N E L L Y**

SES, la redakcio de SES INFORMAS kaj la legantoj tutkore gratulas kaj deziras al Jasmin kaj al la tuta familio ĉion bonan kaj multe da ĝojo kaj feliĉo kun la etulino.
-FL-

oo0oo

**SVISA ESPERANTO-SOCIETO**

**ESPERANTA-PEN-CENTRO**

**TIĈINA ESPERANTO-LIGO**

invitas vin al

**REGIONA SEMAJNFINO ESPERANTISTA EN ITALLINGVA SVISLANDO**

Lugano, 10-11 februare 1996

**GRUPO A: PER I PRINCIPIANTI**

Chi vuole sapere che cosa sia l'Esperanto, come funzioni, e magari imparare, se non a parlarlo, almeno a leggerlo e a capirlo in due giorni. Queste corso accelerato sarà condotto dalla specialista in pedagogia Carla De Lorenzi, che proporrà un'introduzione alla lingua internazionale con una metodologia "diretta".

**GRUPO B: ESPERANTO-PAROLIGA RONDO**

Se vi jam sci(et)as Esperanton,tiam vi eble deziras pliprofundigi tiun scion dankal kapabla instruisto. Ni proponas al vi valoran kaj riĉigan kurson de s-ro Andres Bickel, kiu sur la bazo de la ceftemo de la renkontigo, celas trejni parolon, gramatikon, kaj vortprovizon helpe de diversaj didaktikaj rimedoj.

**GRUPO C: POR SPERTAJ ESPERANTISTOJ**

Prelegos la konata svisa pedagogo kaj Esperanto-specialisto Claude Gacond. Temo: Kio gravas en la instruado de Esperanto? Kiel reale funkcias la lingvo, t.e. laŭ kiuj veraj normoj (ne laŭ la normoj de la lernolibroj, ĝenerale, ĉar la lernolibroj proponas lingvo-uzon eksan)? Kaj kiujn konse-

kvencojn oni povas tiri el tiuj analizoj,en la instruado de Esperanto? Vere ekscita temo por ĉiu, kiu okupiĝas pri Esperanta-instruado, profesie, apudprofesie, aŭ ŝatokupe. Li prezentos multajn ekzemplojn kaj ekzercojn por praktike helpi al ĉiuj,kiuj deziras aliri instruadon, kaj akiri novajn ideojn aŭ precizigi malnovajn.

o0Oo

**M O R T - A N O N C O**

La 30-an de novembro 1995 mortis, 96-jara, sinjorino Paula Schaufelberger (1899-1995) el Zürich. Ŝi estis longjara subtenantino de SES kaj ESZ kaj estis fervora simpatiulino al Esperanto. Pro la alta aĝo ŝi nenie plu povis partopreni, sed vizitantajn konatojn ŝi akceptis ĉiam kun granda ĝojo. La Svisa Esperanto-Societo kaj la Esperanto-Societo Zürich esprimas al la funebranta familio sinceran kondolencon. -FL-

oo0oo

**PETO PRI INTERŜANĜO DE LIBROJ**

Estimataj geamikoj,

La membroj de la Esperantoklubo en Niĵnevartovsk (Siberio) kore salutas vin kaj gratulas okaze de novjaro. Ni deziras bonan sanon, feliĉon kaj sukceson en via vivo kaj bonan laboron en la Esperanto-movado.
Ni proponas interŝanĝi literaturon pri la vivo, ruslingve, germane, france,hispane kaj Esperante. Sincere salutas
La prezidanto: Timofej Ŝuvaev
La sekretariino: Olga Ŝukova
Nia adreso: Rusio, Siberio 626440-Niĵnevartovsk, Str. 60 Let Oktabrja 6-133, Esperantoklubo.

oo0oo

## SOCIOLOGIA ENKETO PRI GEESPERANTISTOJ

Multaj el vi jam ricevis demandaron pri via esperantisteco. Tazio Carlevaro,kun la helpo de soci-sciencista skipo, deziris analizi la svisan esperantan movadon el scienca vidpunkto, por tiri (se eble) konkludojn pri la nuna konsisto kaj nunaj demandoj de la esperantista movado. Ni tamen rimarkis, ke komplete mankas adresoj de junaj geesperantistoj. Mi esperas, ke JES konsentos disponigi sian adresaron al ni. Rememoru, ke tiu demandaro estas strikte anonima. Do ni ne povas scii, ĉu iu eble ricevis ĝin dufoje. Nepre ne plenigu ĝin dufoje.
Alia demando: Pri multaj geesperantistoj ni konis la esperantistecon de la koresponda geedzo. Tial al tiu familio ni sendis du ekzemplerojn de la demandaro, sed certe pri multaj esperanto-geparoj mankis al ni tiaspecaj informoj, kaj tial ni eble "forgesis" aldoni demandilon por la geedzo.Bonvolu tiam skribi al mi, kaj mendi la koncernan demandaron! Eble vi havas filon, kiu ne nur "scietas" Esperanton, sed eĉ bone konas ĝin, kaj kiu deziras respondi al nia demandaro. Ankaŭ li skribu al ni, por ricevi demandilon.
Kiam la pritakso de la studo estos preta,ĝi aperos en mallongigita formo en SES INFORMAS, kaj ni sendos volonte ekzempleron al ĉiu Sviso, kiu deziros ĝin ricevi (sed supozeble ĝi aperos en franca lingvo, aŭ eĉ rekte en angla...). Dankegon al ĉiuj.
INFO: Tazio Carlevaro, Viale G.Motta 32, 6500 Bellinzona.

## RESTARIGO DE PRIESPERANTA INFORMADO

Franclingvaj kaj germanlingvaj geamikoj konsentis kunlabori en la pretigo(traduko) de

informteksto pri Esperanto, kiu aperos ĉ. ĉiun trian monaton (kvarfoje jare) en la germana, franca kaj itala lingvoj. Al la Esperanta publiko mi petas, ke ĝi havigu al mi adresojn de ĵurnaloj, periodaĵoj, publikaj kaj privataj instancoj (fakultatoj, politikaj, kulturaj, informadaj,turismaj ktp), al kiuj ni sendu la tekston. Bonvolu precize indiki nomon, adreson kaj faksan numeron.

**LA RETOROMANĈA**

Vi eble scias, ke aperis la tria radikale plibonigita kaj ampleksigita eldono de "La Retoromanĉa", scienca libro verkita originale en Esperanto fare de d-ro Arthur Baur. Vi ne scias, ke tiu libro bedaŭrinde atingis neniun atenton en la Esperantaj medioj: nek aperis (kompetentaj) recenzoj, nek ĝi iel vendiĝis tra Esperantaj librokanaloj. Tio tre bone indikas la nivelon de nia esperanto-mondo, bedaŭrinde. Estas tamen kurioze, ke tamen la libro tre bone vendiĝas tra tute normalaj libroservoj en Svislando, Germanio, Francio kaj Italio. Tio bone indikas la altan nivelon de la libro.Mi esperas, ke baldaŭ aperos germanlingva taŭgigo (kiun d-ro Baur ĵus pretigis). Post unu monato estos preta ankaŭ taŭgigita versio por itallingvanoj.
INFO: Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona.

oo0oo

**LA ĜENERALA KUNVENO DE SAEF**

okazos sabate la 30-an de marto en instrukcia ĉambro en la stacidomo Luzern. Detalojn vi trovos en la marta eldono de Svisa Fervojisto. Bonvolu jam nun noti la daton.-GE-

oo0oo

**ARTO-ALFABETA 1996** (21.4.-2.5.96.)

ARTO-ALFABETA estas ekspozicio de mempentritaj bildoj, kiuj akompanas la M.O.L.G.A-kongreson de la Svisa urbeto Bielo. La MOLGA-KONGRESO estas laborejo por tiuj, kiuj volas konvinki la Unuiĝintajn Naciojn adopti unikan lingvon kaj eldoni mond-vortaron, kiun ĉiuj lernejoj de la estonto ricevu. La unua MOLGA-KONGRESO jam okazis en Bielo 1995.
Kvarfoje la televido raportis kaj eĉ la agentejo "Keyston" sendis raporton al ĉiuj gazetoj de la mondo. La plej sukcesa artisto de "ARTO-ALFABETA" vendis bildojn por pli ol SFR 20'000.-
Ni eldonas libron pri la ARTO-ALFABETA kun kolorfotoj de la ekspoziciitaj bildoj.Pro la malgranda eldonkvanto kaj la multekostaj kolorfotoj la libro kostas nuntempe SFR 70.-
Per tiu-ĉi letero mi invitas vin aliĝi al ARTO-ALFABETA 1996, kaj skribi al ni por partopreni MOLGA 1996.La ekspoziciitaj bildoj restos ĉe mi, ĝis kiam la libro ARTO-ALFABETA 1996 estos preta. Mi eĉ ŝatus gardi ilin ĝis vendado.
Mi deprenos 25% (minimume SFR 100.-) de la vendoprezo por kovri la elspezojn de la MOLGA-KONGRESO:
Por kompleta programo turnu vin al:

ARTO-ALFABETA 1996
c/o Esperanto
MOLGA-KONGRESO
Poŝtfako 3163
CH-2502 Biel 3

oo0oo

**E N   P R O P R A   A F E R O**

a) En la lastaj monatoj mi ricevis, de la PTT, plurajn adresŝanĝojn de membroj, kiuj translokiĝis. Por ĉiu ŝanĝo ni devas pagi. Tial mia peto: Membroj, kiuj ŝanĝas sian adreson, estas petataj ne forgesi, ke la kasisto nepre bezonas tian informon.Estas li,kiu poste informas ĉiujn, kiuj devas tion scii. Dankon pro via atento. -FL-

b) La jaro 1995 jam apartenas al la pasinteco. Kiel redaktoro de nia informilo SES INFORMAS mi estas kontenta. La kunlaboro kun la grupoj, ĝenerale vidite, estis bona. Certe bele estus, se ĉiuj grupoj en Svislando povus disponigi jarprogramon, tiam la listo de "Grupaj Informoj" estus ĉiam kompleta. Tamen, mi estas kontenta.
En la jaro 1995 aperis du eldonoj 12-paĝaj kaj 4 numeroj 8-paĝaj. Tio unue dependas de la disponebla materialo, kaj due pri la financa stato. Ĉiukaze oni povas diri, ke la eldonoj restis en la kadro de la budĝeto.
Ĝojo por mi estas ankaŭ, ke diversaj legantoj esprimis sian kontentecon pri la aspekto kaj enhavo kaj pri la akurata apero. Koran dankon. Tio instigas min ankaŭ en la nova jaro 1996 prezenti modestan kaj bonaspektan informilon. -FL-

ooOoo

**RAPORTO PRI MIA STAĜO EN LA "KVINPETALO"**
(15-a ĝis 20-a de aŭgusto 1995)

(eltiraĵo el ricevita letero/red.)

La 30-an de julio mi proponis al amiko,kiu vizitis min, montri al li kelkajn vidindaĵojn en nia urbo La Chaux-de-Fonds; interalie mian lernejon, la vilaojn de Corbusier kaj sur la sama flanko de la monto, KCE.
Tie, tute hazarde, ĉeestis la prezidanto de KCE, Giorgio Silfer, kaj la prezidantino de SES, Perla Martinelli. Ili ne nur interesigis mian amikon pri la lingvo kaj varbado por aliĝo al SES, sed ankaŭ al partopreno en staĝo en la "Kvinpetalo".
La amiko tuj decidis eklerni Esperanton.
Mi demandis Giorgion, kiel varbi por Esperanto? La respondo estis: Kurso de doktoro Marco Picasso, pri la temo:

"KIEL PUBLIKRILATI ESPERANTON"?

(ĉi-sube sekvas kelkaj rimarkoj el miaj notoj dum la kurso.)
Por ke varbado funkciu, oni devas agi laŭ la modernaj merkatikaj reguloj. Tio signifas, oni devas plibonigi la bildon de Esperanto, formante kadrojn,precipe inter gejunuloj.
Antaŭ prezentado de la varo al aĉetonto,oni devas krei bezonon kaj prepari la produkton merkatigotan.
La merkatado de Esperanto apartenas al la merkatado de lingvoj. La lingvoj konsistas el

struktura parto kaj
praktika parto.

La harda parto konsistas el la gramatiko kaj la vortaro; dum la enhavo, la karakterizo kaj la uzebleco formas la softan parton.Ekzemple la strukturo de la angla lingvo estas

simpla.Kvankam ĝi havas problemegojn en la prononco, oni povas uzi ĝin en multegaj landoj.
Se produkto estas tro malmultekosta, ĝi ne estas alloga. Ju pli ni konas la malbonojn de varo, des pli ni povas korekti ilin.
Kaptilo estas, kompari Esperanton kun la angla. Diru prefere:
a) Esperanto havas klubojn en pli ol 100 landoj, tio donas internacian hejmecon,
b) Raportu pri la staĝo en la "KVINPETALO".

Por multaj homoj Esperanto identiĝas utopie, do ni devas pruvi, ke ĝi jam bone funkcias kaj utilas.
Gruplaboro estas pli konvena ol memlaboro, ĉar ĝi estas pli agrabla kaj efika.
Kiam oni demandas vin pri la kvanto de Esperantistoj, respondu pri la kvalito: ni estas sufiĉe multaj por rilati kun la tuta mondo!
Kelkaj sloganoj:
Dum aliaj ankoraŭ lernas neregulajn verbojn, vi jam trovis amikinon(amikon!)
La plej bonaj aĵoj en la mondo estas senpagaj: kiel la amo, tiel Esperanto!
Oni devas dramigi la novaĵon, krei problemon estas manko de ekvilibro!
La ricevonto devas opinii, ke io devas ŝanĝiĝi en la propra vivo!
Oni devas personigi la mesaĝon!
La rezulto devas esti, ke la ricevanto estas kontenta pri la solvo!
Esperanto estas nova por multaj, sed la novaĵo estas nek ke ĝi estas lingvo, nek ke ĝi estas facila lingvo. Novaĵo estas ke ĝi ebligas havi geamikojn en multaj landoj!

RIMARKO PRI LA "KVINPETALO".
Por tiu, kiu ankoraŭ ne konas la "KVINPE-

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

TALON", mi diras, ke la kvin dometoj, ĉirkaŭantaj vastan verdan korton, estas tre agrablaj. El la kuirejo venas bonaj odoroj. La manĝo estas bongusta kaj sufiĉa,kun multaj freŝaj legomoj. Dank' al Suzanne Bourot kaj la aliaj prizorgantoj ekzistas tre hejma atmosfero. Tiel oni povas ripozi, studi kaj interkonatiĝi en simpla, sed vere esperantista etoso. Ne maltrafu okazon staĝi en la "KVINPETALO":

Problemoj kaj solvoj:
a) ĉu vi havas problemojn kun la lingvoj,aŭ en la kontakto?
b) ĉu vi ŝatas lerni lingvojn?

Solvoj:
a) Esperanto helpos vin, dank' al sia klara strukturo.
b) Esperanto donos al vi eblecon lerni rapide novajn lingvojn. -J.T. v.B.-

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 2/96 estas la 6-a de februaro 1996.**